# ADORU 351




2. Ho fonto, kiu verŝas sin
en piajn korojn ja sen fin',
konsolon lasu aŭdi,
por ke en sama fido ni
kun ĉiuj homoj tie ĉi
Vin ĉiam povu laŭdi.
Aŭdi,
laŭdi
ni Vin volas.
Vi konsolas
nin en sorto
dum la vivo kaj en morto.

3. Nin ĉiam do konsilu nun,
kaj Vi mem gvidu nin al sun'.
La vojon ni ne konas.
Kaj persistecon donu Vi,
por ke fidelaj restu ni.
Konsilon ni bezonas.
Vidu,
gvidu.
Vi instruas
kaj konstruas.
Ni ĝin vidas,
kaj al Vi ni ĉiam fidas.

4. Emfazon donu al la Vort',
ke ĝi per la ĉiela fort'
en niaj koroj brilu,
por ke per Via am-doktrin'
la tuta kristanaro sin
al Vi nun asimilu.
Vorton,
forton
al ni donu,
ke rekonu
ni la Kriston
kiel la elaĉetiston.

5. Ho dolĉa roso, falu Vi
el la ĉielo super ni:
Bruligu nian amon,
ke ĉiam kun kompato ni
kunulojn traktu kiel Vi.
Ni sentu Vian flamon.
Flegu,
regu
ne intrigo,
sed instigo
al la paco.
Benu nin per Via graco.

O HEILGER GEIST, KEHR BEI UNS EIN • EG 130 • RG 504 • M (Wie schön leuchtet) kaj germana T: Philipp Nicolai 1599, GL 554, EG 70, KG 194, RG 653, EM 196, kp. SPB 119 • germana T: Michael Schirmer 1640 • E: Alfred Conzeth kaj Richard Hoppe, 1965 en EKE 3 • AK 81* • ↑ Luk 11,13